

SANO

JARKOLEKTO 1980

NUMERO 4

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Medicinstaj kolektoj - S A N O – jarkolekto 1980 – numero 04 - Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj ruĝkrucaĵoj.

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicinista sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto

Redaktas: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 718, Ĉeĥoslovakio

Grafika kunlaboranto : Jaroslav Klement, Karlovy Vary

Kiamaniere aboni al nia cirkulero:

KIAMANIERE ABONI AL NIA CIRKULERO :

BULGARIO: STAJĈO GANKOV, p.k. 208, 7000 R U S E

ĈEĤOSLOVAKO: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA

G D R : JURGEN HAMANN, Puchauer Str. N— 3, 705 LEIPZIG, GDR

HUNGARIO: D-ro ISTVAN GAJZADA, Kozalyi Mihaly u. 4/8, 1053 BUDAPEST

JAPANIO : SABURO YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9 GUNNA-KEN

JUGOSLAVIO:ZELIMIR PEHAR, Opatijska 41, 5400 OSIJEK

POLLANDO: STEFANIA WOJCIECHOWSKA, 78-320 POLCZYN YDROJ, ul. 1. Maja 3/3

RUMANIO : MUDr GÁBOR LAZAR, str. Stefan Cel Mare 26/A, 4055 COVASNA

USA : ESPERANTA LINGVA SERVA KOMPANIO, 452 Aldine, apt.501 CHICAGO IL 60657

Cirkulero SANO estas ankaŭ sendebila rekte ĉe nia asocio por 7 irpk aŭ por 3.5 US dolaroj. NE SUNDU ĉekojn! NE FORGESU ANKAŬ MENEDI NIAN GAZETON STARTO KAJ KULTURAN ALMANAKON PANORAMO: KUN KUN ILI VI HAVOS TUTAN KOMPLETON DE NIAJ REGULAJ PRESAĴOJ: DEMANDU PERANTON AŬ NIAN ASOCION

Prof. HAMIDOVA Muhtaram Hamidovna

/Oftalmologia kliniko ĉe Taŝkenta Medicina Instituto Taŝkento 33, Sovetio, Karl-Marks-strato 103/

SUBKONJUNKTIVA ENKONDUKO DE VITAMINA MIKSAĴO ĈE KURACADO DE KERATITOJ

Por kuraci keratitojn mi proponis niksajon, kiu konsistas el 20% solvaĵo de glukozo, 2% solvaĵo de novokaino, 2-5% solvaĵo de askorbata acido, 5-6% solvaĵo de vitamino B1 kaj riboflavino en solvieco 0,001 en 10 ml da distilita akvo. Por unu injekto mi prenis po 0,5 ml de solvaĵoj de glukozo kaj novokaino, po unu guton da solvaĵoj de askorbata acido, riboflavino kaj vitamino B1 /ĉiujfoje pligrandigante dozon je unu guto, kaj kondukis ĝis 5 gutoj por unu fojo, ekde sesa injekto la dozon mi ne pligrandigis/. Por kurso mi preskribis po 10-50 injektojn. Se en kornea tegaĵo krom infiltro aŭ albugo estis nove aperintaj sangaj angioj, mi aplikis la miksajon sen glukozo, anstataŭ ĝi mi aldonis 0,9% solvaĵon de kuirasalo en kvanto 0,25 ml, kaj askorbatan acidon mi uzis po unu guto ĝis fino de kuraca kurso. Sube mi prezentas analizon pri rezultoj, kiujn atingis en kuracado 50 malsanuloj kun keratitoj /34 viroj, 16 virinoj, 15 infanoj/.

Ĉe 25 malsanuloj kun diversaj specoj de herpeta keratito longeco de malsano daŭris de unu jaro ĝis dudek jaroj. Kaŭzoj de akutiĝoj estis gripo, malvarmumo, etaj traŭmoj, reŭmatismo kaj aliaj. Sentivo de kornea tegaĵo plene malestis ĉe 16 esploritaj, estis draste malaltigita ĉe 8. Ĉe malsanuloj, al kiuj vitaminan miksaĵon mi preskribis ekde unuaj tagoj de hospitala kuracado, kun samtempa okazigo de kontraŭvirusa terapio, pliboniĝo okazis pli rapide. Ĉe plimulto da malsanuloj post 2-3 injektoj konstatablis plimalgrandigo de lumotimo, larmofluo, pli rapide disvolviĝis infiltraĵoj. Post 10-12 injektoj surface de ulcero plene epiteliigis kaj sentivo de kornea tegaĵo restariĝis.

Ĉe 10 malsanuloj kun distrofiuj ŝanĝoj de kornea tegaĵo vitaminan miksaĵon mi aplikis kun ĝenerale plifortiga terapio. Vizuso /akreco de vidkapablo/ pliboniĝis je 0,03-0,1. Ĉe 8 malsanuloj kun ftizaj keratitoj la vitaminan miksaĵon mi aplikis sur fono de specifa kuracado. Ĉe infanoj rapide likvidiĝis blefosospasmo, lumotimo. Dissolviĝo de infiltraĵo pli rapidiĝis.

Ĉe tri malsanuloj kun rampa ulcero de kornea tegaĵo la vitamina miksaĵo estis aplikita post plena purigo disde puse, kaj tio helpi dissolvi infiltraĵon kaj akcelis estiĝon de delikata albugo. Ĉe du malsanuloj kun brulvundoj pro alkaloj de 1-2 grado malpliigis lezo, kornea tegaĵo heliĝis. Ĉe du malsanuloj kun vundoj de kornea tegaĵo la vitamina miksaĵo, aplikita je 3-4-a tago post demeto de juntoj, helpis maldikigi cikatrojn. Kelkfoje la vitamina miksaĵo kaŭzis etan ruĝiĝon de okulo kaj nefortan doloron. Apliko de seka varmo dum 10-15 minutoj likvidis tiujn fenomenojn.

Proponita de mi vitamina miksaĵo pruviĝis efika rimedo ĉe kuracado de keratitoj. Oni povas ĝin paliki kun ĝeneralaj kuracaj metodoj al malsanuloj de ajna aĝo. Akreco de vidkapablo ĉe malsanuloj pliiĝis je 0,01-0,8.

En la nomitan miksaĵon en lasta tempo mi kun sukceso plusas 2%-an metionion (1 gutu) kaj 1 guton da ATF (acidum adenosintriphosphoricum).

Flekseblaj endoskopo

KOOPERADO DE KREH PRI MEDICINA TEKNIKO

Sciencaj kaj teknikaj novaĵoj rapide trovas aplikon sur terenoj, kie la evoluo stagnas ĉe apliko de kutimaj rimedoj kaj metodoj. Tiel ankaŭ estis ĉe la lumkondukaj vitrofibroj. Kiam ili enmerkatigis antaŭ kelkaj jaroj, sciencistoj, teknikistoj kaj inĝenieroj tuj uzis ilin por plibonigi endoskopojn. Per tiuj endoskopo la kuracisto esploras korpajn kavaĵojn aŭ internajn organojn, kiel nazo, traĥeo, ezogago, stomako, duodeno, dika intesto, hepato aŭ galveziko.

Pli frue la endoskopo estis provizitaj per malgrandaj inkadeskaj lampoj, kiuj permesis al la kuracisto rigardi la kavaĵon helpe de optika sistemo. Antaŭ ĉio la tradiciaj optikaj sistemoj malebligis la evoluigon de flekseblaj endoskopo. Tial disponeblis nur rigidaj aparatoj kun relative granda diametro kaj limigita aplikotero. La vitrofibroj alportis esencajn avantaĵojn: pro siaj fizikaj ecoj ili povas esti uzataj por la transporto de la lumo kaj de bildoj, eĉ kiam ili estas kurbigitaj. La kuracisto povas atingi per flekseblaj endoskopo praktike ĉiun angulon en la korpo.

Tiuj diagnoziloj faciligas la laboron kaj samtempe liveras pli bonajn rezultojn. Por la paciento la diagnozo kaj terapio fariĝas pli milda. Aldoniĝas la grava avantaĝo, ke la medicinisto per la novspeca endoskopo dum la esploro samtempe povos fari malgrandajn operaciojn, ekz. elpreni histajn pecetojn, forigi malsaniĝintan histon aŭ fotografi certajn lokojn. Tiamaniere oni ekzemple povas forigi polipojn el la dika intesto. Tiu operacio pli frue necesigis la malfermon de la ventro, t. e. plurhoran operacion kun pluraj specialistoj.

Komence de la sepdekaj jaroj interkonsentis USSR kaj GDR, evoluigi kaj produkti flekseblajn endoskopojn. Tiaj instrumentoj, kies pinto povas atingi 180 gradan direktoŝanĝiĝon, tiutempe ne estis produktataj en la landoj apartenantaj al KREH. Grava premiso por tio estis vitrofibroj, pri kiuj disponis nek GDR nek USSR. Fakuloj de ambaŭ

landoj trovis en la specialistoj de la hunaraj optikaj fabrikoj MOM en Budapeŝto kompetentajn partnerojn. Ili liveras la lumkondukajn vitrofibrojn kun diametro de 0,014 mm.

La fakuloj de la esplorcentro en la Kombinato pri Medicina, Laboratoria kaj Pesila Tekniko en Dresden evoluigis bronkoskopon, kies produktadon transprenis la popolpropria entrepreno "Medicinaj Aparatoj" en Berlin. Pasintjare liveriĝis la unuaj flekseblaj bronkoskopoj, kiuj nun jam estas aplikataj en la klinika praktiko.

La sovetiaj partneroj transprenis laŭ interkonsento la taskon produkti endoskopojn por la esploro de la supra digestodukto, de la ezofago, de stomako, duodeno kaj dika intesto. Se kezeple kuracisto volas esplori la inteston en la regiono de apendico, la endoskopo devas esti longa ĉirkaŭ 160cm, kio signifas enormajn postulojn al la kvalitoj de la lumkondukiloj, de mekaniko, optiko kaj de la necesaj malgrandegaj instrumentoj. Tra labora kanaletoj en la ĉirkaŭ 15mm dika fleksebla plast-metala tubo oni povas enigi malgrandajn tondilojn aŭ tenajlojn. Malsaniĝinta histo povas esti forigata per elektrokirurgiaj metodoj: elektron kondukanta maŝo kuŝiĝas ĉirkaŭ la histo aŭ super ĝi kaj altfrekvencaj kurentoj detranĉas la histon. Samtempe la sango koaguliĝas.

La unuaj specimenojn antaŭnelonge testis la Centra Ekspertiza Komisiono por Medicintekniko ĉe la Ministerio pri Sano de GDR kaj la klinikoj "Charité" kaj "Prenzlauer Berg" en Berlin. Ankoraŭ ĉijare la sovetiaj specialistoj volas komenci la produktadon de la unuaj flekseblaj endoskopoj. Ĉe komenco de la seria produktado la endoskopoj denove estos testataj antaŭ ol trovi ĝeneralan aplikon. USSR tiam liveros kvar specialajn endoskopojn al GDR, inter ili ankaŭ ezofago-astroskopon kaj ezogago-gastro-duodenoskopon.

Tiuj endoskopiaj instrumentoj nur estas ekzemploj por la utilo de la kooperado en KREH. Ekde fondiĝo de la Konstanta Laborgrupo pri Medicintekniko ĉe la Konstanta Komisiono pri Maŝinkonstruado de KREH estiĝis kooperaj rilatoj inter GDR, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Hungario, Pollando kaj USSR por pli ol 300 produktoj de la medicintekniko.

Laŭ artikolo en "Wochenpost", Berlin 27/1980/42 de la 17a de oktobro, pg. 17.

Tradukis: Eva Hamann, Alfred-Kastner-Str. 72, DDR-7030 Leipzig.

Kiel batali kontraŭ MALJUNECO?

Prof. Aleksandro MIKULIN

El la gazeto "Sputnik" esperantigis ANt. Sattetk, Příbor

Naturo neniam klopodis konservi altan aĝon de la animaloj. Pri tio atestas multaj faktoj. Ekzemple nedaŭreco de dentaro gvidadas la reprezentantojn de animaloj al antaŭtempa morto pro malsato, malfortiĝado de aŭd- kaj vidsento al morto pro senarmileco. Evidente, ke la naturo klopodis pli rapidigi la evoluon.

Aleksander Mikulin rekomendas jenajn rimedojn kontraŭ maljuneco: **SPIRGIMNASTIKO**

Jam matene, kiam vi dorse kuŝas en la lito, vi produnde spiru kaj je premo de diagragmo elpremu ventron. Haltigu je kvin aŭ tri sekundoj spiradon. Poste elspiru aeron dekfoje tra kunpremitaj lipoj tiamaniere, ke la tuta ventro dekfoje intensive ekstremos.

Du aŭ trifoje dum tago, matene en la lito, dumtage en la sidloko mi praktikas ĉi tiun volgimnastikon. Mi opinias, ke tio estas utila ankaŭ dum malsano, se la kuracisto ordonas kuŝi. La gimnastiko influigas la organon tutece. Plirapidigas ŝanĝojn de materio en ĉeloj kaj helpas muskolojn senigi nebezonaĵojn. Dum ĉi tiu gimnastiko ne forgesu profunde spiri!

KIEL NECESAS PROMENI

Dum promeno oni devas iradi kuraĝe - longpaŝe, surtreti malmole, apogi je kalkano kaj fintreti sur la tuta plando.

Por atingi maksimalan vigecon kaj plensanecon estas necese ĉiutage 15-20 minutojn rapide iri distancon de tri km. Ekzerci oni devas prudente kaj nur iom post iom plirapidigadi la pretendojn. Rapidirado estas utila por internaj organoj, koro, stomako ktp.

VIBROGIMNASTIKO

Homoj, kiuj okupiĝadas je intensiva psika laboro, sentas post kelkaj horoj kapon peza. La cerbo laciĝas. Mi proponas simplan gimnastikon. Oni staros piedfingre, ke kalkanoj estas unu centimetron super la planko kaj rapide oni falos sur la tuta plando - ni eksentas frapan ekstremon. Dum ĉi tiu agado okazos la samo kiel dum kurado. Ĉi tiun ĝimnaston oni nomas "vibro-gimnasto". Ĉi tiuj kortremoj estas necesaj sen rapideco, ne pli rapide ol unufoje dum unu sekundo. Estas rekomendite fari ĉi tiun "vibro-gimnastikon" 3-5 foje po unu minuto.

VIZAĜGIMNASTIKO

Por ke ni ne havu atonian vizaĝon, ni faros ok-dekfoje po du minutoj ekzercojn: El ĉiuj fortoj mi suprentiretas okoble vangojn al okuloj, aŭ lipanguletojn al dentoj. La ekzercoj estas farataj pere de fortaj grimacoj, ĝi ni veku en vizaĝmuskoloj efikan sangan alfluan. Krom tio faru ĉiumatene kaj vespere varman masaĝon de la vizaĝo. Proceduro daŭras ne pli longe ol 3-5 minutoj.

VIVO EN ELEKTRA KAMPO

Laŭ la plej nova esploro la terглоbo estas ŝarĝita negative, ĝi enhavas superfluan elektran ŝarĝon. Inter la tero kaj ionosfero troviĝas elektrokampo. Dum klara firmamento atngas la diferenco de potencialoj en alteco de 1 metro super la tero 125 voltojn. Homa korpo kaj ĝiaj vivĉeloj alkutimiĝis dum milionoj da jaroj al ĉi tiu vivo en elektra medio ĉirkaŭ la mondo. Elektronaj trapenetradis en nudajn piedojn kaj en elektrokondukilajn finnervojn de la prehomoj, kiuj iradis piede. La plej novaj observoj de laboristoj en Instituto deĝenerala higieno en Moskvo montras, ke de veterŝanĝo dependas sanstato de la malsanuloj laŭ loka elektroŝarĝo, analogie ŝanĝas de atmosfera premo, kiu ofte akompanas la terajn elektroŝarĝojn.

Miaj eksperimentoj montas, ke la plej simplaj elektro-aparatoj nekapablas noti la ŝanĝon, kiu estiĝas, se la homo troviĝas en izolita malutila pozitiva elektrostreĉo. Ekzemple, seni kuŝas en la lito kaj kovras sin je kusenego, vi gajnos elektro-streĉon de 700 voltoj! Dum irado sur la linoleo la pozitiva elektro-streĉo atingas milojn da voltoj. Kelkaj unuopuloj estas tiel ŝarĝitaj pozitivbelektre, ke por homoj ŝarĝitaj negativ-elektre estas danĝere doni manpremon, ĉar tuj komencus trasalti sprakoj.

La plej bona maniero de alterigo estas kiu ajn metala kondukilo aligita je unu parto al akvokondukilo aŭ al centra hejtado, la dua parto alpremita la korpo per la nerustebla plateto.

Dum psika laboro estas utile preni en la manon metalan kugleton. Dum la dormado oni povas lasi kuŝi sur la lito finon de la alteriga mola kondukilo. Por atingi laboraktivecon laŭ mia opinio sufiĉas ĉiutage dediĉi al nia sano proksimume 1 kaj duonhoron.

Mi estas konvinkita, ke ĉiu homo en kiu ajn aĝo, kiu kondutos laŭ ĉi tiu reĝimo, sentos sin sana, vigla. Provu tion kaj vi ne bedaŭros!

Aldono: "Tio, kio kaŭzas maljuniĝon, ne estas aĝo, sed perdo de idealoj". (Svĕtlá)- "La homo restadas juna, ĝis kiam li estas kapabla lerni gajnadi navojn ecojn kaj toleri diferencajn opiniojn de ceteraj". (Ebner-Eschnbachová).

Rimarko de la redaktoro:

La artikolo certe enhavas kelkajn ĝenerale nekonatajn konsultojn. Sed salteti sur kalkanoj povas nur tiuj, kiuj ne suferas de perturboj de intervertebraj disketoj!

HUMURAĴO

Ĉe la dentkuracisto

Por kelksekunda eltiro de mia dento tiel granda sumo?

Se vi deziras, venontfoje mi eltirados vian denton dum kelkaj minutoj.

R A P O R T O J

NOBEL-PREMIO POR MEDICINO EN LA JARO 1980

Zdravotnické noviny 46/80

En la jaro 1901 atribuis la Karolina-instituto en Stokholmo la unuan fojon Nobel-premion por fiziologio kaj medicino. Tiam ricevis ĝin germana kuracisto kaj biologo Emil Adolf von Behring por siaj laboroj pri seroterapio. En la sekvaj jaroj gajnis dekunu specialistoj la Nobel-premion por siaj malkovroj en la sfero de imunologio, batalo kontraŭ infektaj malsanoj, preparo de vakcinoj, defendmekanismoj.

La Nobel-premio por medicino en la jaro 1980 estis atribuita kune al tri sciencistoj - du amerikanoj, prof. Snell kaj prof. Benacerraf, kaj al unu franco, prof. Dausset, nome por ilia agado en sfero de genetiko kaj imunologio. Ilia laboro havas eksterordinaran signifon por kompreno de unu el la plej gravaj biologiaj mekanismoj, kiu ekzistas ĉe ĉiuj vertebruloj: temas pri mekanismo certiganta samtempe tutecon de la propra organismo kaj defendo de tiu integreco kontraŭ agresoj el ekstero. Konstato de tiuj mekanismoj kaj ilia genetika lokiĝo havas ne nur teoriant signifon, sed praktikan rezulton en sfero de transplantoj, en klinika medicino kaj en baldaŭa estonteco eĉ en individua kaj kolektiva defendo kontraŭ granda kvanto de malsanoj. Al tio jen konkrctetaj ekzemploj: La unua: nur en Francio jam efektiviĝis 3000 transplantoj de reno, el tio 500 en la jaro 1979; rezultoj estas longtempe pozitivaj en 75% de kazoj. Dua ekzemplo en sfero de profilakso: oni konstatis, ke 98% de presonoj trafitaj per ankiloza spondilartrito havas histan antigenon "B27"; ĉe la personoj kun tiu antigeno estas danĝero de ekesto de tiu malsano meznombro 120 foje pli granda /ĉe virinoj 95 foje, ĉe viroj 600 foje/ ol ĉe alia populacio.

La plej aĝa el ĉi-jaraj laŭreatoj estas profesoro George Davis Snell /77 jj/. Ekde la jaro 1935 li laboris en Jackson-laboratorio en Bar-Harbor. Li estriĝis en tiu laboratorio en la jaro 1949. Prof. Snell okupiĝis jam en la dua duono de la tridekaj jaroj /kune kun anglo P. Gorer/ pri rilato inter transplantoj kaj imunoreagoj. Li konstatis, ke genoj, priinfluantaj histan kompatiblecon ĉe musoj troviĝas en sfero signita kiel H2. Tio estiĝis bazo por esploro de aliaj fakuloj /nome prof. J. J. van Rooda en Nederlando kaj prof. Payne en Usono/, interesiĝantaj precipe pri plua indentiĝo de tiuj "histaj markistoj", decidantaj por pluvivo de transplantitaj organoj. Prof. Snell publikadis precipe el la sfero de histokompatibleco.

Prof. Jean Daŭsset ĉi-jare en oktobro estis 64-jara. Liaj esploroj estis orientitaj precipe al biologia kaj klinika imunohematologio. Tio gvidis lin al malkovro de histaj grupoj, respektive sistemo signita kiel HLA /"human locus antigen"/, event. MHC "major histocompatibility complex"/, kiu ĝin direktas. Prof. Daŭsset ekde aprilo 1978 estas estro de katedro de eksperimentala medicino de College de France - katedro, kiun iam estris Claude Bernard. Al konkretigo de liaj laboroj en sfero de imunogenetiko kontribuis aktiveco de kvincent francaj civitanoj, kiuj libervole subiĝis al longa sango kaj sanga plasmato kaj ilia reinjekto kun aldonitaj ruĝaj ĉeloj ktp.

La plej juna el ĉi-jaraj laŭreatoj de la Nobel-premio por medicino, prof. Baruj Benacerraf, naskiĝis en la jaro 1920 en Venezuelo-Caracas; ekde la jaro 1943 li estas naturaligita civitano de Usono. Post la dua mondmilito li laboris en kuracista esploro en Francio, ekde la jaro 1956

li estis dum 12 jaroj profesoro de patologio en Novjorko, ekde la jaro 1968 li estris fakon de imunologio en Ŝtata Instituto por alergiaj kaj infektaj malsanoj en Bethesda. Antaŭ nelonge li estiĝis direktoro de la esplorcentro por batalo kontraŭ karcinomo ĉe medicina fakultato en Bostono. Kiel la unua li ekkonis kaj priskribis ĉe la besto la areon "I", kiu en genetika komplekso H2 havas decidan rolon por direktado de imunaj mekanismoj kaj plue por konservo de normaleco de la ĉeloj. Tiuj malkovroj havas bazan signifon por esploro de la tumora kresko: ŝajnas, ke la maligneco interrilatas la difekton de la funkcio de la cititaj mekanismoj.

Ankoraŭ aldono pri antaŭ nelonge atribuitaj Nobel-premioj por kemio: ricevis ilin anglo F-Sanger kaj amerikanoj P. Berg kaj W. Gilbert. Ĉiuj tri okupiĝis, kvankam diversdirekte, pri porblemoj de nukleaj acidoj, H. Berg poste pri rekombinaĵo de ADN. Temas do pri praktike laboroj en sfero de molekula biologio kun orientiĝo al deĉifrado de "la mesaĝo" enhavigita en la molekuloj de la desoksiribonukleina acido kaj al la genetika manipulado. Estas interese konstati, ke ĉe atribuo de la Nobel-premioj pri kemio /de sveda reĝa akademio de sciencoj/ oni eksterordinare akcentas signifon de la baza genetika esploro: ekde la jaroj 1958-1960 estis atribuitaj 8 premioj en tiu ĉi sfero.

DE INSPIRO AL MALKOVROJ

Zdravotnické noviny, 35/80

La historio de la kuracado de malario per ĥinino kaj plujaj sintezaj derivaĵoj stimulis kelkiujn sciencistojn al sintezo de la tuta vico da substancoj kun kuracefikoj ofte tute aliaj ol ĉe iliaj antaŭuloj. Hodiaŭaj modernaj kuraciloj havas similan historion kaj en samtempeco kelkiuj esploristoj, ĉefe el la vico de biokemistoj ĉerpas la ingojn por plua laboro ankaŭ en serĉado de kuraciloj kontraŭ karcinomo el naturaj herbaĵoj. Antaŭ la dua milito simila direkto de la esploro estis taksata kiel carlataneco. Nur la malkovro de kemioterapeŭtikoj kaj antibiotikoj ŝanĝis tiujn opiniojn.

La ĉefa fronto de inspiroj por sintezo de novaj kuraciloj liveras asnkau populaj receptoj kaj herbolibro. Ekzemplo estas la bukso /lat. *Cantharanthus roseus*, pli frue *Vinca rosea*/. Tiu ĉi kreskaĵo, uzata en diversaj mondpartoj por kuracado de diabeto, montriĝis eksperimente ĉe ratoj efika ankaŭ je ostmjelaj ĉeloj. Alkaloido gajnita el tiu ĉi herbaĵo esti nomita vinblastino kaj ĝia derivaĵo vinkristino. Malkovro de tiuj preparaĵoj signifis eraon de kemioterapio de infana leŭkemio kaj aliaj malignaj procezoj, stimulis kaj plue inspiris multajn sciencistojn al elserĉado de naturaj kreskaĵoj kun kontraŭkarcinoma efiko.

Ĝis hodiaŭ estis tiamaniere provitaj ĉirkaŭ 250 naturaj produktoj kaj nenombrebla kvanto de kemie sintezitaj preparaĵoj. El tiu ĉi multnombra komenco estas nur kelkiuj konvenaj por klinika provado post konvenaj toksikologiaj kaj farmakologiaj testoj.

Komencante per esploro kaj finante per praktika uzo de elektitaj kemioterapeŭtikoj el la tuta vico da esploritaj, la tuta procezo estas tre malrapida kaj ofte komplikita. La ekzemplo por tio estas ekz. esploro de alkaloidoj elipticino kaj 9-metoksielipticino, kiuj estis malkovritaj en la malgrandaj arboj de la gento *Ochrostinae* /lat/. Montriĝis, ke elipticino kaj ĝiaj derivaĵoj estas fortaj inhibiciaĵoj por multaj malignaj procezoj ĉe eksperimentaj bestoj. Aliflanke antaŭklinikaj provoj montris, ke elipticino povas provoki tutan vicon da apudaj reakcioj, precipe post intravejna apliko. Estis konstatite, ke ĉe simioj "*rhesus macacus*" elipticino difetas sangon kaj korritmon kaj sekve de tio ne estis alpaŝite al klinika provado je homoj. La sciencistoj serĉis variantojn, kiuj povus ĉi tiun alie tre esperdonan preparaĵon eluzi por kuracaj celoj. Estis farita ega peno pli frue, ol oni sukcesis konstrui pli efikajn kaj nedanĝerajn preparaĵojn.

Serĉado de interrilatoj inter la strukturo de la pristuditaj naturaj materioj kaj ĝia efikeco estas nuntempe nur en komenco. Kelkiuj kondutas kiel memstara elipticino, dum aliaj ligiĝas firme al arganikaj histoj kaj kaŭzas per tio ilian formorton. Tial pliparto da karcinomaj substancoj

havas ĵuste citotoksan efikon .Nur tre malfacile oni povas elekti el ili tiujn, kiuj kaŭzas selektive, tio signifas, ke ili speciale trafas malignajn ĉelojn kaj la sanajn atakas nur ete. Ĵuste tiurilate atendas la sciencistoj la plej multajn inspirojn por plua laboro el la naturo kun celo konstrui produktojn ĉiam malpli toksajn sed sufiĉe efikajn kontraŭ la malignaj ĉeloj.

NEFUMU! ĈU VI FUMAS?

/Laŭ Zdravotnické noviny, ĈSSR/

La slogano de la Monda Sanitara Organizo "Fumado aŭ sano - via elekto" devas ne nur pruvi, ke la fumado kaj sanitaro konscieca konduto estas du tute nekuneblaj nocioj. MSO proklamis ĉi tiun jaron je la jaro de nefumado, ĉar ĝi konscias, ke unutagaj agadoj ne povass gvidi al la ŝanĝoj de la kutimoj de la fumantoj. Jam en la jaro 1975 estis konstatite en la broŝuro de MSO "Fumado kaj ĝia influo je la sanstato", ke neniuj aliaj unuopaj aranĝoj povas savi pli multe da homvivoj ol signifa malleviĝo de konsumo de cigaredoj. En la plua broŝuro el la jaro 1976 "kontrolado de la cigareda epidemio" rekomendis MSO konsideri la nefumemon normala maniero de la socia konduto kaj subteni ĉiujn aranĝojn, kiuj gvidas al tiu celo. Sed estas malgaja fakto, kiel skribas la gazeto "Deŭtsches Arzteblatt", ke ankoraŭ multaj kuracistoj ne konsciiĝis la unfluon de la fumado pri sanstato de la homaro en ĝia plena vasta graveco. Ankoraŭ daŭre fumas la tuta vico da kuracistoj, kvankam dudekjara stud-raporto pri 35000 kuracistoj lasis neniun en dubo, ke la fumadmorto evitas eĉ ne kuracistojn! La nombro de infarktoj de kormuskolo antaŭ la 45-a jaraĝo estis ĉe la kuracistoj-fumantoj minimume 15 foje pli alta ol ĉe la nefumantoj. Morteco de kuracistoj antaŭ 70-a jaraĝo altiĝis dufoje.

La kuracistoj devus forlasi fumadon ne nur en propra intereso, sed ankaŭ kun konsidero pri sia personeco, ĉar ili ĉi-rilate devus prezenti sin kiel ekzemplo por aliaj unuopuloj. Kiu konsideras la zorgon pri la sanstato de la paciento la supera leĝo de sia kuracista profesio, devus mem ne fumi jam el tiu kaŭzo, ke la konsilo de la kuracisto-fumanto al la paciento, ke li forlasu fumadon, povas neniun fumanton konvinki, se mankas aŭtoritato de la kuracisto kiel ekzemplo. Multaj kuracistoj konsideras fumadon pli pri iom privata afero ol pri unuaranga priminaco de la sanstato. Malbonaj sekvoj de la fumado devus ĉiun kuraciston devigi, por ke li dum sia ĉia agado aktive kontribuu al la batalo por la malleviĝo de la konsumo de cigaredoj. La demando "Ĉu vi fumas?" devus esti integra parto de ĉiu kuracista interparolo jam el la vidpunkto de minimume tiuj 12 gravaj malsanoj de la homo, kiuj estas per la fumado aŭ kaŭzita aŭ ĝia evoluo favore priinfluita. En la kazo de la jesa respondo de la paciento li devus konsili per tre urĝa maniero forlason de la fumado, precipe ĉe fumantoj de cigaredoj kaj ĉe fumantaj gravedaj virinoj.

Ŝajnas, ke multaj kuracistoj la konsilon pri nefumado neglektas precipe pro tio, ke ili mem ne estas kapablaj trovi konvinkan rekomendon en tiu kazo, se la paciento demandas ilin, kiamaniere li povas seniĝi de tiu malbonkutimo.

INFLUO DE HEMODIALIZO KAJ TRANSPLANTO PRI ATEROSKLEROZO

/Lancet, 8163. I., 276-2788, 1980/

Literaj sciigoj montras, ke kardiovaskularaj malsanoj estas oftaj ĉe pacientoj kun rena nesufiĉeco, kuracitaj per dializo kaj transplantado. La rilato de mortkazoj pro infarkto de kormuskolo kaj ikto estas ĉe tiuj pacieŝtoj pli granda kompare al normala populacio. La aŭtoroj faris analizon de kaŭzoj de mortoj kaj malsaneco en serio de 104 pacientoj en la aĝo inter 8 kaj 62 jaroj kun fina stadio de rena malsano kun celo konstati, ĉu dializo kaj transplantado de reno rapidigas evoluon de aterosklerozo, Nur 4 el 37 mortkazoj estis sekvo de infarkto de kormuskolo, sekvaj 2 alia manifestiĝo de okluzia arteria malsano. Grava ateromo estis hazarda truvo dum nekropsio de nur 3 plujaj pacientoj.

Simpata arteria malsano evoluigis nur ĉe 3 el 61 vivantaj pacientoj; 2 aliaj pacientoj kun infarkto de kormuskolo transvivis sensimptome longan tempon. Tiuj ĉi faktoj montras, ke dializo kaj transplantado povas ebligi klinikan manifestiĝon de antaŭe gajnita aterosklerozo, sed ili ne pravigis la hipotezon, ke ili rapidigas aterosklerozon.

Estimataj gekolegoj,

certe taŭgas fine de la jaro diri kelke da vortoj. Ne nur esprimi niajn dankojn por via kunlaboro kaj rebonado de nia modesta informilo SANO, sed ankaŭ diri, ke certe tio ne estas nur nmia celo.

Al ni ŝajnas, ke ni povus fari multe pli, ol ĝis nun ni faras. Verŝajne ni bezonas ankaŭ organize pli intime kunlabori kaj helpi el nia komuna intereso: enkonduki la Esperanton en nian medion. Kiamaniere? Tio ne eblas simple diri. Nia strategio bezonas inteligentajn taktikajn paŝojn.

Verŝajne estus bezona, ke medicinistoj estontjare kunvenus kaj ne nur el nia lando sed kun geesperantistoj-medicinistoj almenaŭ el najbaraj landoj. Tie ili povus trakti diversflankaj demandojn por komuna celo.

Nin interesus viaj opinioj pri tio. Bonvolu kaj skribu al adreso: Ĉeĥa Esperanto Asocio, medicina sekcio, Jilská 10, 110 00 Praha 1 kýz

PERE DE NIA GAZETO VI POVAS ABONI ANKAŬ PLIAJN

Jarabono por 1981/Kĉs nomo de gazeto aperas jare

25,-	STARTO - presorgano de ĈEA	6x
40,-	Bulgara Esperantisto	12x
16,-	Panoramo-kultura almanako	1x
15,-	Der Esperantist	6x
15,-	Juna Amiko	3x
40,-	Homo kaj Kosmo	4x

RIPORTO SKRIBITA EN LA PENDUMILA MAŜO

JULIUS FUĈÍK

La libron vi povas mendi ĉe nia asocio, aŭ ĉe niaj perantoj.

Prezo: Kĉs 25,- NGLD 10,- aŭ egalvaloro

/ne inkluzivas sendokostojn(.

Ni akceptas ankaŭ irpk 14,-. Por sendokostoj ne forgesu aldoni pluajn 3 irpk.

Korespondi deziras:

26-jara kuracisto-terapeŭto deziras korespondi kun kuracistoj el la tuta mondo, interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn: SU-282001 TERNOPOĻ,
p.l. 83, Igor GALAJĈUK

F-ino BUI THI TO LAN, 24-jara kuracistino, 49/5 LUANG HUN KHANH, P13, Q.I.T.P. HEM, HO CHI MINH-VILLE, Vjetnamio

Anna Benitez ZAIZ, kuracistino, Calle Benito Morell 28, c/Gabriel Garcia y M. Goméz, GUAJUMERO-CAMAGUEY, Kubo - deziras korespondi kun la tuta mondo.

D-ro Ferenc HEGEDUS, Bánki D, u. 59, H-28840 OROSZLÁNY, 34-jara edziĝinta pediatro deziras korespondi. Li ŝatas popolan muzikon.

S-ano Leon MONTGOMERY, Box 932, ORLANDO Fl. 32802 USA, deziras korespondi kun kuracistino, kiu eventuale interesiĝas pri balneologio.

NOVAJ ELDONAĴOJ:

Nia asocio eldonis kunlabore kaj kun financa helpo de la BALNEA reprezentejo de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj fontoj, 110 01 Praha 1, Pařížská 11, tel. 263777 novan multkoloran bildkarton kun la nomo

ĈEHOSLOVAKAJ ŜTATAJ BANLOKOJ

Sur la bildkarto vi trovos plejkonatajn banlokojn Mariánské Lázně, Jáchymov, Karlovy Vary, Františkovy Lázně.

Bildkartojn vi povas mendi ĉe Ĉeĥa Esperanto Asocio, Jilská 10, 110 01 Praha 1. Minimuma mendo-kvanto estas 10 ekz. Prezo sume 16 Kčs + sendokostoj. Se vi mendos min. 100 ekz. ni ne kalkulos la sendokostojn kaj paketon ni sendos registrite. Abonantoj el eksterlando turniĝu al niaj perantoj. La kvanto 10 ekz. kostas 5 gld.

HIDRAŬLAJ MEĤANISMOJ

estas nova terminaro eldonita far CEA. La teminaro krome de ĉeĥa kaj esperanta versio enhavas klarigojn en germana, rusa, angla kaj franca lingvo. Ĝi estas bezona helpilo ne nur por fakuloj. La prezo 16,00 Kčs aŭ 6,5 gld. De la kvanto 10 ekz, ni ne fakturos la sendokostojn kaj donos 30% rabaton por libroservoj.

Ankaŭ tiun libron vi povas mendi je sama adreso kiel suprajn bildkartojn.

Restas en nia stoko ankoraŭ terminaro el medicinista fako. Aŭtoro MUDr. Hradil. La terminaro estis eldonita sub la nomo

MEDICINA ESPERANTO TERMINARO

Prezo 19,- Kčs aŭ 6,5 gld. Mendokondiĉoj samaj kiel supre.